Mi lernas ĉiam kun plezur'

Mi lernas ĉiam kun plezur'
Plezuron havas mi
Tial mi volas lerni nur
Ĉu vere ankaŭ vi?
Se vi kaj mi eklernu nun
Ne gravas la erar'
Ne estos pluvo, nur la sun'
Nur ĝojo sen kompar'

Venu lernu ankaŭ vi
Venu lernu nur kun mi

Mi iras ĉiam tra l'natur'
Naturon ŝatas mi
Tie mi volas vivi nur
Ĉu vere ankaŭ vi?
Se vi kaj mi promenu nun
Tra kampoj kaj arbar'
Ripozo estas sur la dun'
Plezuro ĉe la mar'

Venu vivu ankaŭ vi
Venu vivu nur kun mi

Mi serĉas ĉiam kun bravur'
Bravuron havas mi
Kie la am' troviĝas nur?
Ĉu ankaŭ serĉas vi?
Se vi kaj mi kunvivu nun
Ne nur kiel najbar'
Ne estos nuboj, nur la lum'
Kaj amo por la par'

Venu amu ankaŭ vi
Venu amu nur kun mi

Klaus Friese, 2018